

Vol. I. November, 1906 No. 2.

L'AMERIKA ESPERANTISTO

SECRETARIAL BUREAU

And International Esperanto Agency

For a small fee we receive, re-address and forward the business correspondence of firms or individuals requiring London office address. Samples of merchandise received in bulk and distributed to addresses as per lists supplied, or to addresses selected by us. We have extensive and varied mailing lists, maintained with greatest accuracy. To save expense of foreign postage we print or mimeograph circulars, etc., fill-in names, addresses and dates of imitation typewritten letters, etc., supply and address envelopes, stamp and post complete. On statement of probable requirements further details will be supplied.

ADAIR & CO.

39 Victoria St., Westminster, London, England

Oklahoma City, U. S. A.

WHY ESPERANTO IS INTERNATIONAL.

The wonderful progress of Esperanto as the international language is due almost wholly to the facility with which it can be learned. In reply to a request for his opinion regarding the prospect of a universal language, Count Leo Tolstoy, the famous Russian author, wrote the following:

Gentlemen:—There cannot exist the slightest doubt that mankind tends ever to form but one family, having for sole guides wisdom and love, and that one of the best means of attaining to this ideal is to arrive at a mutual comprehension. But, in order that the peoples may comprehend one another, it is necessary either that all the languages should reduce themselves to a single one, which can happen but after a very long time—if indeed ever. Or, that a knowledge of all languages shall become so general that not only shall works be translated into every one of these tongues, but everyone shall understand them so well as to be able to make himself intelligible to all mankind, by the aid now of this one, now of that. Or, better still, that all shall choose a language the study of which shall be obligatory to each people. Or, finally, as the partisans of Volapuk and Esperanto suppose, that all men of all nations shall adopt and understand an international language, artifical and simple. This last hypothesis appears to me the most reasonable, the most serious, the most easy to be realized.

Such is my reply to the first point. As regards the second—to what extent Esperanto satisfies the requirements of an international language—I cannot reply in a manner altogether decisive, not being a competent judge of this subject. I know one thing, however, and that is that I have found Volapuk extremely complicated, and Esperanto, on the other hand, very simple—as indeed every European must find it. It is so easy to understand that, when I received, some six years since, a grammar, a dictionary and some articles in this language, I was able, in two short hours, if not to write, at any rate to read, the language fluently.

In any event, the sacrifices any speaker of a European tongue would make, in devoting some time to the study of Esperanto, are so small and the results which could thereby be achieved so enormous, if all, at least the Europeans and Americans—all Christendom—should comprehend this tongue, that the attempt, at least, should be made.

I have often thought that there is no more Christian science than the study of languages, that study which permits of our communicating and allying ourselves with an incalculable number of our fellow men, and I have often remarked how people bear themselves as enemies to one another, solely because they have no means of intercommunication. The study of Esperanto, then, and its diffusion, is assuredly a Christian labor, which hastens the coming of the kingdom of God, the main—I should say, the only—aim of human life.

L'Amerika Esperantisto

A Monthly Journal of Esperanto, the International Language

Subscription, per year, One Dollar. Jara Abonpago, 1 dolaro; 5 frankoj; 2 rubloj.

Oklahoma City, U. S. A.

408 Baltimore Building

Vol. I

November, 1906

No. 2

COMMENDATION FROM OUR FRIENDS, THE ENEMY.

One of the friends of the Emperor of Austria says that he abominates Esperanto, because "the rascally anarchists, with a grammar and word-book, are able, after half a dozen lessons, to make themselves understood by all the others in the entire world."

This is praise indeed. With quite as much logic the gentleman might abominate railways because they enable anarchists to travel from one country to another. It will not escape the notice of any reasonable person that if Esperanto can be learned in half a dozen lessons sufficiently well to be made a means of communication between two persons of totally different native speech, it is worthy of adoption, not only by anarchists, but by diplomats, missionaries, hod-carriers and kings. If the brilliant Austrian is sufficiently young and healthy he may hope to live long enough to see this accomplished.

A California Esperantist, writing to *L'Amerika Esperantisto*, asks what we think of the *ter'tremoj* (earthquakes). Secretly, we think that even the San Francisco jar will be outclassed when some American colleges throw overboard their load¹ of dead languages and accord official recognition to the liveliest language in a living age—Esperanto.

From Spain comes the news that in a city of that nation, Engurea, the bakers and weavers showed great enthusiasm in learning Esperanto. We have, indeed, a language possessing that simplicity which places it within reach of the day laborer, and at the same time the wonderful wealth of expression which commends it to the scholar and scientist.

L'AMERIKA ESPERANTISTO.

THE PROGRESS OF ESPERANTO.

In this department we intend, as well as is possible in a few words, to inform our readers concerning the progress which the language is making in the entire world. As may be understood, our information is not yet as complete as one would desire, especially in America, where although the movement is now being rapidly organized, it is still in the nebular stage. In Boston, New York, Philadelphia and many other cities are strong clubs, and the work is progressing well. The journals of the United States are very favorable in their attitude toward Esperanto. The Ladies' Home Journal, in the May number, gave much space to an excellent article on Esperanto. Lessons are being published in the Chicago Chronicle, Philadelphia North American, Boston Post and St. Louis Globe-Democrat. Our Times, a teachers' journal of New Jersey, also publishes lessons. But the most important efforts for Esperanto during the present year have been made by the Christian Endeavor World, of Boston, under the direction of Mr. Amos. It is publishing an entire series of lessons, and the great interest of the Society of Christian Endeavor, caused by the world convention of the society in Geneva, is having important consequences. Many persons of different nations attended the convention, and, thanks to the efforts of this journal, the Americans found themselves easily conversing with persons of other nations, whose national languages they did not know.

Most of the Esperanto clubs in America have recently been united in an organization known as The American Esperanto Society, with offices in New York. The society will soon begin the publication of an official propaganda journal, to be called *The American Esperantist*.

Argentine Republic.—Some of the most important journals of this country are publishing articles concerning the language, and the interest increases.

Australia.—This country has many active Esperantists, and magazines and newspapers are used to advertise the movement. Clubs have been formed in some of the cities.

Belgium.—The Central Esperanto Office (of the world) is located in Belgium, and everywhere in the kingdom the cause is always growing. *La Belga Sonorilo* is published at Duffel.

Brazil.—Some of the largest cities have Esperanto clubs, but at the date of the latest reports, no Esperanto journal.

Bulgaria.—The official gazette of the movement in Bul-

PROGRESO DE ESPERANTO.

En tiu ĉi fako ni intencas kiel ebla plej bone malmultvorte sciigi legantojn pri la progreso kiun la lingvo faras en la tuta mondo. Kompreneble, nia sciigo ĝis nun ne estas tiel plena kiel oni dezirus, precipe pri Ameriko, kie, kvankam la movo estas nun rapide organizata, ĝi ankoraŭ estas iomete nebula. En Bostono, Filadelfio, Nov-Jorko kaj multaj aliaj urboj estas fortaj kluboj, kaj la afero bone progresas. La gazetaro de la Unuigitaj Ŝtatoj bone kondutas al Esperanto. La *Ladies' Home Journal*, en la Maja eldono, donas grandan spacon al tre bona artikolo pri la lingvo. Lecionoj estas publikigataj en la *Chicago Chronicle*, *Philadelphia North American*, *Boston Post* kaj *St. Louis Globe-Democrat*. *Our Times*, lernejista ĵurnalo de Nov-Jerzo, ankaŭ publikigas lecionojn. Sed la plej gravaj klopoj por Esperanto dum la nuna jaro faris *The Christian Endeavor World*, de Bostono, sub la direktado de S-ro. Amos. Gi enhavas tutan serion da lecionoj, kaj la granda intereso de la membroj de la Societo por Kristana Celado, kaŭzita de la tutmonda kunveno de la societo en Genevo, havas gravajn sekvojn. Multe da personoj el tre diversaj nacioj estis ĉe la kunveno, kaj, danko estu al la klopoj de tiu ĉi ĵurnalo, la Amerikanoj sin trovis facile kunparolantaj kun alilanduloj kies lingvojn naciajn ili ne komprendis.

La plimulto de la kluboj Esperantaj en Ameriko antaŭ nelonge unuiĝis en organiza nomita *The American Esperanto Society*, havanta oficejon en Nov-Jorko. La societo baldaŭ komencos la eldonadon de oficiala propaganda ĵurnalo, nomota *The American Esperantist*.

Argentina Respubliko.—Kelke da la plej gravaj ĵurnaloj de tiu ĉi lando publikas artikolojn pri la lingvo, kaj la intereso kreskadas.

Australio.—Tiu ĉi lando enhavas multajn agemajn Esperantistojn, kaj revuoj kaj ĵurnaloj estas uzataj por anoncadi la movadon. Kluboj formiĝis en kelke da la urboj.

Belgujo.—La Centra Oficejo Esperanta (tutmonda) estas lokigita en Belgujo, kaj ĉie en la regno la afero ĉiam kreskas. La Belga Sonorilo estas eldonata ĉe Duffel.

Brazilujo.—Kelke da la plej grandaj urboj havas klubojn Esperantajn, sed je la dato de la plej novaj raportoj, ne ĵurnalon Esperantan.

Bulgarujo.—La gazeto oficiala de la movado en Bulgarujo,

L'AMERIKA ESPERANTISTO.

Bulgaria, *Unua Paso*, is published at Sofia. Esperanto is growing also in Bulgaria.

Chile.—In Valparaiso there is a very large Esperanto club, and the cause continually gains strength.

Denmark.—This country has some Esperanto clubs, but has no official publication.

France.—In the Esperanto world, this nation makes the greatest progress. Nearly every city has its own Esperanto club, and in Paris thousands of people speak the language. "*L'Esperantiste*," "*La Revuo*," "*Juna Esperantisto*," "*Internacia Renvo Medicina*," "*La Revuo de l'Esperanto*," "*Espero Pacifista*," (organ of the International Peace Society) and "*Esperanto Ligilo*" (for the blind), are a list of the publications wholly or partly edited in Esperanto.

Germany.—The German Esperantists are working hard and accomplishing much. Most of the large cities have Esperanto societies, and in Berlin the official organ, "*Germana Esperantisto*," is published.

Great Britain.—The British Esperanto Society, offices at 13 Arundel Street, London, at the time of the latest report had sixty-two affiliated societies. Many Esperantists in the United States first received information concerning the language through English friends or publications. England has two gazettes, *The British Esperantist* and *La Esperanta Studento*.

Holland.—Active propaganda work is being done in this little nation, and reports concerning the progress appear in *La Belga Sonorilo*.

Hungaria.—Esperanto is well founded and rapidly growing. *Esperanto* is the name of the official publication, issued at Budapest.

India.—Marikuppam, Bombay and other cities have Esperanto clubs. "*La Pioniro*," is published at Marikuppam.

Italy.—Rapid progress is now reported from Italy, where the matter was for a long time apparently lifeless. *Idealo* a monthly gazette, is published at Palermo, and in Naples, *Gefraturo Esperantista*.

Japan.—Not long ago a grammar and vocabulary of the Esperanto language was prepared in this country, and now the Japanese are making great progress in Esperanto. Clubs are found in many cities.

Malta.—Many Esperanto clubs in this beautiful island are united in a society, "*Malta Stelo*."

Mexico.—In our neighboring republic the language has been making progress. It has a gazette, *La Meksika Lum-*

L'AMERIKA ESPERANTISTO.

Unua Paño, estas publikigata ĉe Sofio. Esperanto kreskas ankaŭ en Bulgarujo.

Cilo.—En Valparizo estas tre granda klubo Esperantista, kaj la afero ĉiam kreskadas.

Danujo.—Tiu lando havas kelkajn Esperantajn klubojn, sed ne havas oficialan publikigajon.

Francujo.—Tiu ĉi nacio, de la mondo Esperanta, plej bone antaŭeniras. Preskaŭ ĉiu urbo havas ĝian propran klubon Esperantan, kaj en Parizo miloj da homoj parolas la lingvon *L'Esperantiste*, *La Revuo*, Internacia Scienca Revuo, *Espero Katolika*, *Tra la Mondo*, *Juna Esperantisto*, Internacia Revuo Medicina, *La Revuo de l'Esperanto*, *Espero Pacifista* (organo de la Internacia Societo Esperanta por la Paco), kaj *Esperanta Ligilo* (por la blinduloj) estas gazetaro, tute aŭ parte redaktata en Esperanto.

Germanujo.—La Germanaj Esperantistoj forte laboras kaj multe faras. Plimulto de la grandaj urboj havas societojn Esperantajn, kaj en Berlino la organo oficiala, Germana Esperantisto, estas eldonata.

Granda Britujo.—La Brita Societo por Esperanto, oficejo 13 Arundel Street, Londono, je la tempo de la plej novaj raportoj, havas sesdek-du filiigitajn societojn. Multe da Esperantistoj en la Unuigitaj Ŝtatoj unue ricevis sciigon pri la lingvo de Anglaj amikoj aŭ ĵurnaloj. Anglujo havas du gazetojn, *The British Esperantist* kaj "La Esperanta Studento."

Hollando.—Agega laboro de propagando fariĝas en tiu ĉi malgranda nacio, kaj raportoj pri la progreso aperas en "La Belga Sonorilo."

Hungarujo.—Esperanto estas forte fondita kaj rapide kreskas. Esperanto estas la nomo de la oficiala publikigajo, eldonata ĉe Budapesto.

Hindujo.—Marikupamo, Bombejo kaj aliaj urboj havas klubojn Esperantajn. "La Pioniro" estas eldonata ĉe Marikupamo.

Italujo.—Rapida progreso nun estas raportata de Italujo, kie la afero longtempe restis kvazaŭ senviva. "Idealo," ĉiujmonata gazeto, estas eldonata ĉe Palermo, kaj Gefrataro Esperantista, ĉe Napolio.

Japanujo.—Antaŭ nelonge, gramatiko kaj vortaro de la lingvo Esperanto estis pretigita en tiu lando kaj la Japanoj faras grandan progreson en Esperanto. Klubo ĝi trovas en multaj urboj.

Malto.—Multaj Esperantaj kluboj en tiu belega islando estas kunligita en societo, "Malta Stelo."

Meksiko.—En nia najbara respubliko la lingvo jam de longe progresas. Ĝi havas gazeton, *La Meksika Lumturo*, kaj

L'AMERIKA ESPERANTISTO.

turo, and many Esperantists. The Mexican Herald, a daily newspaper of the City of Mexico, recently printed a long article about the language.

Norway.—In Norway there is no Esperanto gazette, but active clubs are found in Christiania and other cities.

Paraguay.—This little nation has its Esperanto clubs.

Peru.—Of the nations of South America, Peru is making the greatest progress in Esperanto. In Lima there is a journal, *Antaûen Esperantistoj*.

Russia.—The political condition in this unhappy country greatly hinders the progress of Esperanto, which, as one may understand, is not regarded with good-will by any European monarch. St. Petersburg has a strong and brave society which publishes a monthly journal, *Ruslanda Esperantisto*. Everywhere in Russia and Siberia are many individual Esperantists, and in Finland the language makes very great progress, that country having many active clubs.

Sweden.—For a long time Esperanto was cultivated by individuals and local societies in Sweden, and during this year a well-edited journal, *Esperantisten*, was founded in Stockholm.

Switzerland.—The world convention, which took place at Geneva this year, gave to the cause a wonderful impetus. An Associated Press dispatch stated that the people had "gone crazy over Esperanto." The Esperanto gazettes of Switzerland are *Socia Revuo*, *Esperanto*, and *Flugila Stelo*, a publication for stenography and Esperanto.

ESPERANTISM.

Declaration given by the first International Esperanto Congress in Boulogne-sur-Mer, August 9th, 1905.

Because many have a very incorrect idea concerning the essence of Esperantism, therefore we, the undersigned representatives of ' Esperantism in different lands of the world, convened at the International Esperanto Congress in Boulogne-sur-Mer, have found it necessary, according to the proposal of the author of the Esperanto language, to give the following explanation:

1. Esperantism is an attempt to disseminate in the whole world a language neutrally human, which, not intruding itself in the internal life of the people, and aiming not at all to crowd out the existing national languages, would give to the people of different nations the ability mutually to understand each other, which can serve as a peace-making language in the public institutions of those where different nations fight among themselves about the language; and in which can be published those works which have an equal interest for all peoples. Any other idea or hope which this or

L'AMERIKA ESPERANTISTO.

multajn Esperantistojn. *The Mexican Herald*, ĉiutaga ĵurnalio de la Urbo de Meksiko, antaŭ nelonge enpresa longan artikolon pri la lingvo.

Norvegujo.—En Norvegujo ne estas Esperanta gazeto, sed agemaj kluboj sin trovas ĉe Kristianio kaj aliaj urboj.

Paragvajo.—Tiu ĉi nacio malgranda havas ĝiajn klubojn Esperantajn.

Peruo.—En la nacioj de Suda Ameriko, Peruo faras la plej grandan progreson Esperantan. En Limo estas gazeto, *Antaŭen Esperantisto*.

Rusujo.—La politika stato en tiu ĉi malfeliĉa lando grande malhelpas al la progreso de Esperanto, kiu kompreneble, ne estas rigardata kun bonvolo de iu Europa monarĥo. St. Peterburgo havas fortan kaj bravon societon, kiu eldonas ĉiunmonatan ĵurnalon, *Ruslanda Esperantisto*. Ĉie en Rusujo kaj Siberujo estas multaj individuaj Esperantistoj, kaj en Finlando la lingvo faras grandegan progreson, tio lando enhavanta multajn agemajn klubojn.

Svedujo.—Esperanto de longtempe estis kulturata de individuoj kaj lokaj societoj en Svedujo, kaj dum la nuna jaro bone redaktata ĵurnalio, *Esperantisten*, komenciĝis en Stokholmo.

Svisujo.—La tutmonda kunveno, kiu havis lokon ĉe Genevo dum la nuna jaro, donis al la afero mirindan antaŭenpuŝon. Unu depešo de la *Associated Press* sciigis ke la popolo “fariĝis freneza pro Esperanto.” La Esperanta gazetaro de Svisujo estas *Socia Revuo*, *Esperanto*, kaj *Flugila Stelo*, gazeto por stenografio kaj Esperanto.

LA ESPERANTISMO.

Deklaracio donita de la unua internacia Kongreso Esperantista en Boulogne-sur-Mer, la 9-an de aŭgusto 1905.

Car pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, representantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso Esperantista en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon.

1. La Esperantismo estas penado disvastiĝi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu “ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn,” donus al la homoj de malsamaj nacioj, le eblon kompreniĝadi inter si, kiu povos servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povos esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ

L'AMERIKA ESPERANTISTO.

that Esperantist connects with Esperantism, is his purely private affair, for which Esperantism does not answer.

2. Because in the present time no one who investigates doubts this—that an international language can be only an artificial language, and because, of all the many attempts made in the last two centuries, all present only theoretical projects; and a language actually finished, tried in every way, perfectly vital and in all respects worthy is shown in one sole language—Esperanto; therefore the friends of the idea of an international language, being conscious that theoretical disputation will lead to nothing, and that the aim can be attained only by practical labor, have all gathered about the Esperanto language and are working for its dissemination and the enrichment of its literature.

3. Because the author of the Esperanto refused once for all, in the beginning, all personal rights and privileges relating to this language, therefore Esperanto is “nobody’s property,” neither in a material nor in a moral relation. The material master of this language is the whole world, and every one so desiring can publish in or concerning this language all works which he desires, and use the language for all possible purposes. As spiritual masters of this language will be always regarded those persons who of the entire Esperanto world shall be confessed as the best and most talented writers of this language.

4. Esperanto has no personal law-giver and depends on no separate man. All opinions and works of the creator of Esperanto have, like the opinions of any other Esperantist, a character absolutely private and are mandatory for nobody. The sole once-for-always foundation of the Esperanto language, obligatory to all Esperantists, is the little work, “*Fundamento de Esperanto*,” in which nobody has the right to make a change. If any one shall diverge from the rules and models given in the said work, he can never justify himself by the words, “thus wishes or advises the author of Esperanto.” Every idea which can not be expressed by that material which is found in the “*Fundamento de Esperanto*,” every Esperantist has the right to express in the manner which he finds most correct, the same as is done in any other language. But for the complete uniformity of the language it is recommended to all Esperantists to imitate as much as possible the style which is found in the works of the creator of Esperanto, who has labored most for and in Esperanto and best knows its spirit.

5. An Esperantist is any person who knows and uses the Esperanto language, being entirely equal, for whatever purposes he uses it. Membership in some active Esperanto society is recommended to every Esperantist, but is not obligatory.

L'AMERIKA ESPERANTISTO.

alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia **afero** pure privata por kiu la Esperantismo ne respondas.

2. Car en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke lingvo internacia povas esti nur lingvo arta, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj, faritaj en la daŭro de la lastaj du centjaroj ĉiuj prezentas, nur teoriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj pleje taûga montriĝis nur unu sola lingvo Esperanto, tial la amikoj de la ideo de lingvo internacia, konsciente ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam de longe ĉiuj grupeiĝis ĉirkaû la sola lingvo Esperanto kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.

3. Car la aûtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unofoje por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas **"nenies propraĵo"** nek en rilato materiala, nek en rilato morala.

Materiala majstro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aû pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvo por ĉiaj eblaj celoj; kiel spiritaj majstroj de tiu ĉi lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj de tiu ĉi lingvo.

4. Esperanto havas neniu personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo. Opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute privatan kaj por neniu devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la Lingvo Esperanto estas la verketo "Fundamento de Esperanto," en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas provigi sin per la vortoj "tiel deziras aû konsilas la aûtoro de Esperanto." Ciun ideon, kiu ne povas oportune esprimata per tiu materialo,, kiu troviĝas en la "Fundamento Esperanto," ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu seias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva Societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.

L'AMERIKA ESPERANTISTO.

LA GAZETARO.

La Revuo.—Eldoniĝis 1'an de Septembro, en Parizo, nova gazeto, *La Revuo*. La unua eldono enhavas komedion de Rusa aŭtoro, N.V. Gogol, tradukitan de D-ro Zamenhof. Ankaŭ estas poemo de la aŭtoro de Esperanto, "Mi Aûdas Vin." F. de Menil verkis artikolon, "La Mortigistoj de Stradella." "Henrik Ibsen kaj la Francoj" estas serioza artikolo verkita de G. d'Aulnaye. E. Boirac verkis artikolon kaj V. Inglado poemon kaj rakonton de la edziĝo de la Reĝo Hispana. La kovrilo de *La Revuo* estas flamanta ruĝa, la tutmonda kolorsigno de libereco kaj frateco.

The British Esperantist.—Plej interesa al Amerikano en la Oktobra eldono estas traduko de "La Korvo" (The Raven) el Edgar Allen Poe, de D. H. Lambert. La tradukinto fide konservis la ritmon kaj stilon de la poemo. "Ni Ellernadu la Lingvon!" meritas enpreson en ĉiu gazeto Esperanta. La artikolo forte petegas ĉiujn Esperantistojn zorgege sin plibonigi je la lingvo.

Espero Pacifista.—"Pacon per Esperanto" estas la devizo de tiu ĉi bele presata kaj bone redaktata gazeto. Ni multe bedaŭras ke la spaco mankas por enpresi kelke da la bonaj Esperantaj artikoloj kiujn ĝi enhavas.

Esperantisten.—La Sveda organa, havante paralelajn kolonojn Svedajn kaj Esperantajn. La eldono Aûgusta enhavas la parolon de Zamenhof ĉe la Bulonja kongreso.

Lingvo Internacia.—Tiu ĉi gazeto, tute Esperanta, estas nun en ĝia dek-unua jaro. Gi enhavas multe da literaturo kaj diversaĵo kaj aperas duonmonate. Speciale ĝi havas daŭrigatan kalendaron de terkulturo, kun diversaj interesaj kaj valoraj sciigoj je la terkulturisto.

Ruslanda Esperantisto.—La enhavo de tiu ĉi ĵurnalo estas bona kaj diversa. Precipe rimarkinda estas la movo por la scienco, nomita "homaranismo," kiu sin difinas "la scienco de homa frateco."

L'Esperantiste.—Oficiala ĵurnalo de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto. La Septembra eldono estas tute plena je rakonto pri la Geneva kunveno. Tiu ĉi bona ĵurnalo estas nun en ĝia naŭa jaro.

Tra la Mondo.—La Septembra numero enhavas bonajn rakontojn, kun ilustraĵoj, de la Geneva kunveno, kaj multe da aliaj interesaj. En speciala aldono ĝi havas la paroladon de D-ro Zamenhof. *Tra la Mondo* estas en la antaŭa Esperanta vico.

La Suno Hispana.—En la Septembra eldono estas rakonto pri la kunveno ĉe Genevo kaj multe da bonaĵoj. En formato de malgranda libreta kajero estas teatra verko.

Esperanto (de Hungarujo).—Tiu ĉi gazeto ilustrita havas dek-du paĝojn Esperantajn kaj Hungarajn. La numero ricevita enhavas ilustraĵon de la belega Hungara parlamentejo.

La Belga Sonorilo.—De longe (kvin jaroj) tiu ĉi bona

L'AMERIKA ESPERANTISTO.

sonorilo sonoras la ĝojan harmonion de Esperanto. Gi estas unu el la plej grandaj kaj plej taŭgaj jurnaloj de la tuta gazetaro Esperanta. La Oktobra numero enhavas, tiel sama kiel la aliaj, tre interesa rakonton pri la kunveno.

Esperanto.—Svisa-Franca jurnalo, eldonata ĉe Genevo, enhavas bonan raporton pri la dua kongreso, kun la parolo de Zamenhof stenografita ĉe la kunveno.

NI ELLERNADU LA LINGVON.

Ni estas ĉiuj interesataj pri la progresado kaj disvastigado de nia lingvo; tiuj, kiuj ne estas tiaj, ne meritas la nomon "Esperantisto." Por atingi nian celon, oni proponas diversajn rimedojn; kelkaj personoj diras, ke ni devas interesigi la registrojn, aliaj, ke ni devas varbi la komercistaron, kaj ankoraŭ aliaj, ke la sola rimedo troviĝas ĉe la geinfanoj, kiujn ni devas instruadi. Ciu estas prava; ni devas klopodi utiligi ĉiujn ĉi rimedojn, sed restas alia, pri kiu mi penos pritrakti per la nuna humila artikolo. *Ni mem devas ellernadi la lingvon!* Se ni bone scias Esperanton, ni helpas al la afero; sed se ni ne bone ĝin scias, ni iom ĝin malhelpas. Kial? Laŭ mia opinio, ni malhelpas al la afero, ĉar ni sen-kreditigas ĝin ĉe la ne-Esperantistaro. Ekzemple, ni multe paroladas pri Esperanto kaj laŭdadas ĝian praktikecon kaj taŭgecon. Niaj amikoj ne-Esperantistaj estas skeptikemaj, eble mokemaj. Okazas, ke unu el ili ricevas ekzempleron de Esperantista jurnalo kaj donante ĝin al ni li diras: "Angligu por mi tiun artikolon." Ni rigardegas la artikolon, sed ni devas konfesi ke ni ne povas ĝin bone traduki, sed ni diras al la amiko, ke ni ĉeestis hieraŭ vespere sukcesplenan Esperantistan teokunvenon! Alia amiko, kiu nin aŭdadas laŭdantajn la lingvon, estas eble fervora botanikisto. Li diras al ni: "Vi laŭdadas la praktikecon de via lingvo. Nu, mi multe deziras klarigojn pri iaj herboj, kiuj kreskas en Hungarujo. Skribu al via tiea korespondanto kaj petu lin, ke li nin sciigu pri tiuj ĉi punktoj." Ni tralegas la demandojn de nia amiko, sed ni ne povas ilin esperantigi, aŭ, eble, ni skribas al nia korespondanto, sed lia responde estas nekomprenebla. (Kompreneble la alilanduloj devas ellernadi ankaŭ; mi parolas al la tuta Esperantistaro.) Tiam, ni montras

L'AMERIKA ESPERANTISTO.

al nia amiko nian belegan kolekton da hungaraj ilustritaj poštarkoj, sed li ne interesiĝas pri ili kaj ricevas la klarigojn france, aǔ eĉ angle! Aliaj amikoj kelkafoje diras al ni dum niaj promenadoj kaj paroladoj: "Kiel oni dirus la jenan frazon esperante?" Ni ne scias. Vane ni diras al niaj amikoj, ke, kvankam ni ne povas angligi la esperantajon, nek esperantigi la anglaĵon, kaj kvankam nia hungara korespondanto ne povas nin klarigi esperante pri la herboj, tio ne sekvas pro la netaĝeco de Esperanto, sed pro nia nescieco de la lingvo. Ne! nia amiko antaŭe estis skeptikulo, nun li konvinkiĝas pri la netaĝeco de Esperanto, kaj tia li restados. Li estas mallogika, sed bedaŭrinde, plej ofte niaj amikoj tiamaiere rezonas. Infano angla aǔ fremdulo ne povas bone paroli aǔ kompreni la anglan lingvon, sed tio ne pruvas, ke la angla lingvo estas malpraktika. Tamen, ni senĉese paroladas *pri* Esperanto kun niaj amikoj kaj tiel, se ni renkontus fremdan Esperantiston ĉe unu el ili kaj ne povus paroladi *en* Esperanto kun la fremdulo, ni multege malhelpus al la afero. Niaj amikoj diras: "Mi ne intencas esplori tiun aferon; oni povas interŝanĝi ilustritajn poštarkojn kaj trinki teon sen Esperanto!" Jes, ni mem devas ellernadi la lingvon. Ni legadu la "The British Esperantist," ni ellernadu parkere la "Ekzercaron," ni laboradu senĉese por imiti la stilon, kiun ni trovas en la "Krestomatio" kaj "Hamleto," la stilon de la Doktoro mem, ne forgesante la ellernardon de la "Sintakso." Unu el la plej bonaj lernolibroj esperantantistaj estas sendube la "Commentaire." Estas bedaŭrinde, ke ne estas tia lernolibro verkita angle; la "Commentaire" estas verkita france. Tamen, kvankam ni scias nur tre malperfekte la francajn lingvojn, ni povas sufiĉe kompreni la "Commentaire" per la multenombraj ekzemploj, esperantaj, kiuj troviĝas en tiu libro. Multe el ni estas komizo ĉe komercaj firmoj. Ni aĉetu do la "Komercaj Leteroj" kaj aliajn komercajn esperantajn lernolibrojn. Eble nia estro iam ricevas Esperantan leteron el alilando. "Ho!" diras li. "Jen estas letero, kiun mi ĵus ricevis. Ĝi estas verkita en lingvo, kiun mi ne kompresas. Ĉu ĝi estas Esperanto? Vi multe babiladas pri tiu lingvo, traduku la leteron por mi." Sed ĉu ni ellernadis la komercan Esperanton? Ni komencu ellernadi ĝin nun.

Estas necese, ke ni pruvu la praktikecon de Esperanto. Por ke ni povu tion fari: Ni ellernadu la lingvon!—*R. J. McLaren, Esp. 11303, en The British Esperantist.*

L'AMERIKA ESPERANTISTO.

ESPERANTO—A CRITICISM

(1) Ŝikago, (2) Ills., (3) Oktobro 7, 1906.

Al la (4) Ĉef Redaktoro,

Sinjoro:

Mi deziras proponi kiel (5) batalapostulon al viaj legantoj, por la celo de diskutado, miajn (6) unan impresojn (7) de la lingvo Esperanta. Permesu (8) min diri ke ĝi (9) ŝajnas al mi ke la lingvo estas (10) deficit, en unu esenca kvalito almenau; nome, ĝi ŝajnas ne havi veregan idiomon. (11) Tiel la artefarita monstro (12) konstruinta (13) per "Frankenstein," tiel ĝi havas perfektan korpon; sed ne animon (15) kia ajn; (16) en aliaj vortoj, ĝi (17) bezonas la veran guston de tero. Gi ne estas majesta, (18) antikva kverko, prujna kun aĝego, kreskanta de ĝia naska tero (19) riciĝata (20) por la tradicioj de la antaŭpatroj kiuj plantis kaj zorgegis (21) tiu ĉi maljunegan arbon. Ne! ĝi ne estas la kverko mem; sed nure brilakolora fungo sur ĝiaj radikoj; kaj (22) kiun estos kondamninta al frua kadukeco. (23) Eble (24) ĝi estas ke tiu ĉi elpenso, (25) (Honorego al la distinga (26) elpensisto!) kiu estas ne vera lingvo, sed nura legaro, aŭ bastarda lingvo estus tre utila en komercaj interkonsentoj; kaj amuzega kaj interesa, por inteligenta (27) ekzerco; sed ĝi ne povos (28) ĉiam havi veran literaturon.

Kredeble mi estas (29) parolanta malprudente, tiel nescia kiel mi estas, de la eblecoj de la Esperanto, sed oni diras ke persono ne povas juĝi preter lia sperto.

NESCIULO

(1) Ĉikago is the accepted Esperanto spelling. (2) Certainly the name of the state should be in Esperanto, conforming with the remainder of the line. We would suggest *Ilinojo*.. (3) Esperanto uses the accusative case for dates. Literally the date would read, *j^a l^e. se^{ptem}ber tagon de Oktobro*, but common use shortens it to *7'an de Oktobro*. (4) *Ĉef*, if used as an adjective, must have the adjective sign, *a*; ordinarily it is used as a prefix—*cefredaktoro*. (5) *Batalpostulon*, not accusative; the adjective terminal should be dropped when words are combined. The meaning would be better expressed *je temo por diskutado de viaj legantoj*. (6) *Unuan impresojn*, should read *unuajn impresiojn*.. (7) *De* means "of, by, since, from;" *pri*, "concerning", would be better. (8) *Permesu al mi* is better. (9) One writes *pluvas*, "it rains"; *estas*, "it is"; *ŝajnas*, "it seems." (10) This form the writer probably takes from *deficito*, which, as we understand the term, refers to a financial deficit. A better form would be *iom mankas*. (11) *Simila al* is better. (12) Should read *konstruita*.. (13) *Per*, "by means of", signifies

L'AMERIKA ESPERANTISTO.

the tool, means or method; the correct preposition here is *de*. (14) *Kiel* seems to be superfluous. (15) *Kian*. (16) *Alivorte*, "other-word-wise", is much better. (17) Use *mankas*. There is a distinction between *mankas* and *bezonas*. (18) *Maljuna*. (19) This word would, in English, read "being becomed rich". After *iĝ* the passive participle is unnecessary. Here, the word should be *riĉigita..* (20) *Por*, "for the purpose of", use *de*. (21) Should read *prizorgegis tiun ĉi*, or *zorgegis pri tiu ĉi*. (22) Not accusative. *Estos kondamninta*; literally, "which will have condemned." This should read *kiu estas kondamnita*. (23) *Ebla*. (24) Omit *gi*. (See 9.) (25) Would be better, *estu honorego*. (26) *Elpensinto* or *aŭtoro* is correct; *isto* signifies the professional. (27) *Ekzerco por la inteligenco*. (28) *Ciam*, always; *jam*, ever. (30) *Pri*. (29) Remember that in Esperanto most words have a defined and fixed meaning. *Paroli* means to speak or talk. *Paroli letere* is quite as absurd as *skribi telefono*. There are practically no pitfalls in Esperanto, while English is full of them, and the American who writes to one ignorant of the marvelous versatility of some English words, may expect his correspondent to be somewhat puzzled over such expresions as *mi esperas aŭdi de vi* (by letter) or *mi ĝojas vidi ke vi estas sana* (by post card.)

La letero antaŭa, skribita de Esperantisto havanta ĉirkaŭ kvar semajnojn da kono je la lingvo, montras la opiniojn de kelkaj personoj ne bone konigitaj kun la lingvo. Oni devas pensi, vidante la erarojn en lia letero, ke li eble jam ne legis bonajn verkojn Esperantajn. Certe, la plej brilaj verkistoj de la mondo ankoraŭ verkas en siaj patraj lingvoj; kaj, konfeseble, Esperanto ne havas tiel grandan originalan literaturon kiel, ekzemple, havas la Franca aŭ Angla lingvo. Sed de tio, oni ne devas ekdiri kun tro multe da aplombo, ke ĝi ne estas lingvo literatura. Se la Ĉikago mem-konfata "nesciulo" legus la du paroladojn de Zamenhof, unu ĉe la malfermo de la Bulonja kongreso kaj la dua ĉe Genevo, li devegas konfesi ke por simpla, kortušanta elokventeco la Esperanto posedas multe da eblecoj. Se vi ne povas nun bone esprimi ĉiun personon Esperante, kaj doni al la penso pli precizan kaj delikatan esprimon ol iam antaŭe, tiu ĉi do ne pruvas ian mankon je la lingvo; ĝi nur certigas tion kion vi mem konfesas—ke vi bezonas pli lerni pri la lingvo.

The book of Matthew has been translated into Esperanto. It is the hope of its advocates that Esperanto will be a powerful agency in establishing on earth the reign of the principles of universal brotherhood taught in the Sermon on the Mount.

EKZERCOJ.

Fluanta akvo estas pli pura ol akvo staranta senmove. Promenante sur la strato, mi falis. Kiam Johano batas Jozefon, tiam Johano estas la batanto kaj Jozefo estas la batato. Al homo, pekinta senintence, Dio facile pardonas. Trovinte pomon, mi ĝin mangis. La tempo pasinta jam neniam revenos; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas. Pasero kaptita estas pli bona ol aglo kaptota.

Flowing water is purer than water standing motionless. Walking on the street, I fell. When John beats Joseph, then John is the (person who is beating) and Joseph is the (person who is being beaten).

A man, sinning unintentionally, God readily pardons. Having found an apple, I ate it. The past will never return; the future no one knows. A sparrow captured is better than an eagle to be caught.

Nun li diras al mi la veron. Hieraŭ li diris al mi la veron. Li ĉiam diradis al mi la veron. Se mi petus lin, li dirus al mi la veron. Mi estas amata. Mi estis amata. Mi estos amata. Li estas invitata. Li estos invitata. Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi. La surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi. Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita. Estu trankvila; mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ.

Now he tells me the truth. Yesterday he told me the truth. He always told me the truth. I am loved. I was loved. I shall be loved. He is to be invited. He was about to be invited. He will be about to be invited. This article (of commerce) is always willingly purchased by me. The overcoat has been bought by me, consequently it belongs to me. When your house was being built, mine had already been built for a long time. Be at ease; my entire debt will soon have been paid to you.

Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruata en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn. Kie vi estas? Kien vi iras? Mi iras en la ĝardenon. Mi vojaĝis en Hispanujo. Mi vojaĝis en Hispanujon. Super la tero sin trovas aero. Kvankam vi estas riĉa, mi dubas ĉu vi estas feliĉa. Ni disiĝis kaj iris en diversajn flankojn—mi iris dekstren, kaj li iris maldekstren. Mi konas nenion en tiu ĉi urbo. Mi neniel povas kompreni kion vi parolas.

According to the project of the engineers, this railway is to be constructed inside of two years, but I think it will be more than three years in process of construction. Where are

L'AMERIKA ESPERANTISTO.

you? Where are you going? I am going into the garden. I journeyed in Spain. I journeyed into Spain. Above the earth is found air. Although you are rich, I doubt that (whether) you are happy. We separated and went in different ways—I went to the right and he went to the left. I know no one in this city. I can in no way understand what you say.

Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion, "je" Anstataû la vorto "je" ni povas ankaû uzi la akuzativon sen prepozicio. Mi veturis du tagojn kaj unu nokton. Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aû, mian perditan feliĉon). Li parolas, kaj lia parolo fluas dolĉe kaj agrable. Ni faris la kontrakton ne skribe, sed parole. Starante ekstere, ni povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo.

If we need to use a preposition and the sense does not show us what preposition to use, then we can use the common preposition, *je*. Instead of the word *je* we can also use the objective without a preposition. I traveled two days and one night. I sigh over my lost happiness. He speaks and his speech flows sweetly and agreeably. We made the contract not in writing (writely) but verbally. Standing outside, we could see only the outside of our house.

Li tuj faris kiun mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro. La fera bastono, kiu kûsas en la forno, estas nun brule varmega. Ĉu li donis al vi jesan respondon aû nean? Por ĉiu acetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero. La fotografisto fotografis min, kaj mi sendis la fotografajon al mia patro. Glaso de vino estas glaso en kiu antaûe sin trovis vino, aû kiun oni uzas por vino; glaso da vino estas glaso plena je vino.

He immediately did what I wished, and I thanked him for the immediate fulfilling of my desire. The iron rod which lies in the stove is now burning hot. Did he give you an affirmative or negative reply? For every pound of tea purchased, this merchant adds a pound of sugar, free. The photographer photographed me, and I sent the photograph to my father. *Glaso de vino* is a glass in which wine has been, or which one uses for wine; *glaso da vino* is a glass full of wine.

LA FAKO DE KORESPONDADO

Se vi respondos al korespondantoj, ni enpresos malsupre vian nomon kaj adreson, dum tri monatoj, por 25c; (fr. 1.35). Se pli ol adreso, 25c po linio. Klarigo: 1) pos'tkartoj 2) markoj 3) leteroj.

Hindujo.—1-2) A. Smith, Champion Reefs, Mysore State, S. India.

1-3) S-ro C. E. Jeffery, sama adreso.

1-3) S-ro. E. W. C. Graham, la sama.

1-2) S-ro. R. F. Vaughan, Marikuppam, Mysore State, S. India.

Ruslando.—1) S-ro. L. Titov, dom Serpukovskogo Monastyria, Valovoja ulica, Moscow, Russia.

Ameriko.—1) S-ro John H. Vich, No. 2285, Street 68 S. E., Cleveland, Ohio, U. S. A.

1) Frederic L. Comstock, 1611 Fulton St., Brooklyn, N. Y.

1) F-no. Laura M. Fisher, Oklahoma City, U. S. A.

1) F-no Jo Coffin, 411 W. Grand, Oklahoma City, U. S. A.

1) S-ro. Archinard, 408 Baltimore, Oklahoma City, U.S.A.

LA GAZETARO ESPERANTISTA

Ni povas anonce malsupre nur la gazetojn kiuj sendas du kajerojn regule al L'Amerika Esperantisto.

Esperantisten—Sveda kaj Esperanta; jare, Fr. 3.50. Adreso: P. Ahlberg, 38, Surbrunnsgaten, Stockholm.

Esperanto—Franca-Esperanta; jare, Fr. 3.75. Adreso: 15 Quai de l'Ile, Genevo, Svisujo

Esperanto.—Hungara kaj Esperanta lingvoj; jare, Kr. 3.80. La administranto. Marieth Agoston, Papnevelde-u. 6, IV, Budapest

La Belga Sonorilo—Organo de la Belga Ligo Esperanta. Franca, Flandra kaj Esperanta; jare, Fr. 4. J. Coox, Duffel, Belgujo.

La Revuo—Internacia monata literatura gazeto, kun la konstanta kunlaborado de D-ro. Zamenhof. Jare, Fr. 7. Ad: Librejo de Hachette kaj Ko., 79, Boulevard St. Germain, Paris.

The British Esperantist—Monata organo de B. E. A. Angla kaj Esperanta lingvoj. Jare, 1s. 6d.; kun aldono, 3s. Adreso: Sekretario B. E. A., 13 Arundel St., Strand, London.

Tra la Mondo—Tutmonda Revuo Esperanta, multilustrata, jare, Fr. 8; kvaronjare, Fr. 2.25. Sin turnu al: Tra la Mondo, 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-O.) France.

Ruslanda Esperantisto—Rusa kaj Esperanta lingvoj: jare, 8 Fr. No. 24, B. Podjaceskaja, St. Peterburgo, Ruslando.

La Suno Hispana—Esperanta kaj Hispana lingvoj; jare, Fr. 3. Avellanas 11, Valencia, Hispanujo.

PRINCIPAL POINTS OF THE ESPERANTO GRAMMAR

Noun ending,	-	-	o	Conditional mode,	-	us
Adjective ending,	-	-	a	Subjunctive	"	u
Plural	"	-	i	Imperative	"	u
Objective case ending	-	-	n	Present participle (active)	anta	
Adverb (derived)	"	-	e	Past	"	inta
Infinitive verb	-	-	i	Future	"	onta
Present tense	-	-	as	Present	"	(passive) afa
Past	"	-	is	Past	"	ita
Future	"	-	os	Future	"	eta

Pronouns form the possessive by adding the adjective ending. For possessive of nouns, use the preposition *de*. The adjective takes the case and number form of the noun it modifies. Prepositions are followed by the nominative case.

CIRKULERO PROPAGANDA

Kion vi faras por Esperanto? Kiam vi skribas al geamikoj, vi eble ne povas klare kaj detale ilin konigi kun la bona lingvo. Por helpi al vi tion fari, ni preparis bonan folieton, presitan sur tre luksa papero kaj facile esti enmetota en kovrilo ordinara; havanta plenan klarigon pri Esperanto. Sendu vi la cirkulerojn al viaj ne-Esperantistaj geamikoj, surskribanta vian nomon. Se pro viaj kiopodoj viaj amikoj abones L'Amerika Esperantisto, vi ricevos, kiel PREMIO, la sekvantajn:

LA KRISTNASKA SONORADO

Traduko de "A Christmas Carol," de Dickens. Ricevebla pro la sendo de unu nova abono al L'Amerika Esperantisto.

STUDENT'S COMPLETE TEXT BOOK

Aprobita de D-ro. Zamenhof, kreinto de Esperanto, por Anglaj studentoj de la lingvo. Bone bindita; plej necesa por studento, kaj bonega Kristnaska donaco per amiko. Ricevebla senpage pro du novaj abonoj.

ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY

Kun tradukoj de la Esperantaj vortradikoj kaj klarigoj pri la uzoj. Aprobita de Zamenhof. Ricevebla pro tri novaj abonoj; prezo, afrankite, unu dolaro.

ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY

Enhavas pli ol 15,000 vortojn Anglajn kun tradukoj Esperantaj. Aprobita de D-ro. Zamenhof. Tre helpplena por oni kiun skribas en Esperanto. Sendata senpage pro du novaj abonoj al L'Amerika Esperantisto. Prezo, 60 cendoj.

SINTAKSO

Gramatiko plena (tute en Esperanto) por la studento; de tre konata Francia Esperantisto, S-ro. Fruictier. Prezo, 40c; sendata senpage pro du novaj abonoj al L'Amerika Esperantisto.

 La cirkulerojn cititajn ni ne povas sendi senpage: la premioj estas tro mullekostaj. La cirkulerojn propagandajn ni vendas je la kosto, 100. 40c.

POŠTKARTO LA PLEJ BONEGA!

Surhavas la tutan Gramatikon de Esperanto,
kun plena spaco restanta por skribi scilicon.

Certege, io eldonata de L'Amerika Esperantisto estas bone presata. La karto kun tuta Gramatiko surpresita estas bonega propagandilo, kaj ilin ni vendas je la kosto, po 100 afrankite, 50c. Specimeno, 1c.

KARTOJ ABONPAGAJ

Se vi deziras tuj ricevi ian premion supre cititan, sendu nun 18 abonpagon, kaj ni sendos al vi abonkartojn, kiuj estos iam doneblaj kaj vendebaj al aliaj personoj, kaj riceveblaj de ni por abonoj. Nur niaj abonantoj povas ricevi premiojn.

PROPAGANDU VI LA ESPERANTON!